



Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = hungaraj kronoj 5,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = germanaj markoj 4,50 = portugaliaj rejsoj 1200 = brazilaj rejsoj 2500 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 20 heleroj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 15 ŝpenigoj por duonpaga petilinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: Paul Nylén, en la redakcio de »Vårt Land«, Stockholm, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: Paul de Lengyel, en Szegzárd, Magyarország (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la administranto.

POR SINJOROJ LITERATURISTOJ.

En n-ro 10—11 de nia gazeto por la pasinta jaro estis presita mia unua rakonto »Du renkontiĝoj«. Al tiu ĉi rakonto mi aldonis rimarkon, en kiu mi petis niajn amikojn, ke ili traduku mian rakonton en naciajn lingvojn kaj presu ĝin en naciaj gazetoj aŭ ĵurnaloj, notante, ke tiu ĉi rakonto estas originale verkita en Esperanto kaj presita en »Lingvo Internacia«.

Tiu ĉi mia rimarko povis montriĝi nekomprenebla kaj stranga por la legantoj de nia gazeto. Tamen, mi faris tion ĉi kun la sola celo: alporti al nia afero, per mia verko, eble plej grandan utilon.

Kompreneble, mia verko povas esti ne tre bona, sed ĉiu konsentos, ke en diversaj naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj iam estas presataj ankoraŭ pli malbonaj verkoj. Cetere, literatura indico de verko ne estas io plej ĉefa en tiu ĉi okazo. Estas la plej ĉefa: montri al la mondo, ke en la lingvo internacia ekzistas propra originala literaturo, ke en la lingvo internacia oni

pensas kaj memstare verkas, kiel en la naciaj lingvoj. * Mi pensas, ke tio ĉi estas ekstreme grava, kaj tial mi petas niajn amikojn, ke ili traduku en siajn naciajn lingvojn kaj presu en siaj naciaj gazetoj aŭ ĵurnaloj ĉiun mian originale verkitan rakonton, kiu estos presita en »Lingvo Internacia«. Kaj mi konsilas, tiel ankaŭ agi rilate ĉia beletristika produktaĵo de nia originala internacia literaturo. Tradukoj de tiaj verkoj, kiel mi opinias, estos volonte akceptitaj de redakcioj, prefere — de malriĉaj provincaj redakcioj.

Mi revas nun pri tio, ke ni iam povos kolekti kaj eldoni en nia lingvo tutan libron da originalaj beletristikaj produktaĵoj, verkitaj rekte en la lingvo internacia. Tia libro povus esti tre utila por la ellernado de nia lingvo, ĉar ĝi donus al komencantaj esperantistoj agrablajn kaj tre interesajn legadon el la produktaĵoj de propra, originala esperantista literaturo. Tradukita en diversajn naciajn lingvojn, tia libro estus por nia afero bonega propagandilo kaj

* Se oni pensas kaj verkas ion malbone, tio ja ne estas la kulpo de la lingvo mem. M. S. R.

povus alporti al ni eĉ signifan materialan profiton, ĉar beletristikaj libroj ne tute malbonaj ĉiam havas sufiĉe grandan sukceson kaj ĉiam estas rapide disvendataj.

Entute, mi pensas, ke unu originala verko, kvankam ne tre bona, estas multe pli grava kaj ŝatinda por ni, ol dek plej bonaj tradu-

koj de plej bonaj naciaj verkoj, ĉar nur originala verko estas plene nia propraĵo, laŭ formo kaj ankaŭ laŭ enhavo. Nur originala verko povas pruvi al la mondo, ke nia lingvo estas io efektive vivanta. Kaj el ĉiu nia originala verko ni devas eltiri por nia afero tiom da utilo, kiom ĝi povas nur doni.

M. S. Rakitski.



NACIAJ PROVERBOJ.

Naciaj proverboj estas plej bonaj, plej prosperaj aforismoj. Ili estas ekstrakto, esenco de la popola penso. En la mallongaj vortoj de proverbo ĉiam estas kaŝita tre multe da bona enhavo, iam — pli multe, ol en ia granda libro. Krom tio, naciaj proverboj rilatas plej diversajn flankojn de la ĉiutaga komunehoma vivo, kaj tial estas egale interesaj por la tuta homaro. Fine, ĉar la proverboj estas verkitaj de simplaj, malkleraj (kvankam tre saĝaj) homoj, ili estas egale kompreneblaj por klera kaj ankaŭ por plej malklera homo. Tial, mi pensas, ke naciaj proverboj, tradukitaj en la lingvon internacian, estas tre bona materialo por nia gazeto kaj estas tre utilaj por la ellaborado de nia lingvo. Mi almetas tie ĉi 20 elektitajn rusajn proverbojn kaj pensas, ke se aliaj kunlaborantoj de la gazeto agos laŭ mia ekzemplo, nia gazeto havos novan, tre interesan rubrikon. Oni devas nur esti eble plej severaj en la elektado, por ke nia gazeto ricevu nur la plej bonan el tiu grandega trezoro da penso, kiun prezentas la proverboj de diversaj nacioj.

RUSAJ PROVERBOJ.

- | | |
|---|--|
| <ol style="list-style-type: none"> 1. Forĝu feron, dum ĝi estas varmega. 2. Ne riproĉu spegulon, se vizaĝo estas malbela. 3. Malnova amiko estas pli bona, ol du novaj. 4. Timu hundon satan kaj homon malsatan. 5. Ne fosu kavon por alia, — vi mem enfalos en ĝin. 6. Per honesta laboro vi ne akiros ŝtonan palacon. 7. Se vi devigos malsaĝulon preĝi, li frunton disbatos. 8. Malriĉeco ne estas malvirto. 9. Ne estas malpura tiu maro, el kiu hundo trinketis. 10. Al kolera bovino Dio ne donas kornojn. 11. Dronanto kaptas eĉ pajleron. 12. Sata ne komprenas malsatan. | <ol style="list-style-type: none"> 13. Per mensogo vi trairos la tutan mondon, sed jam reen ne venos. 14. Laŭ vestaĵo oni renkontas, kaj laŭ saĝo oni akompanas. 15. Ĉevalo ne estas kolego al porko. 16. Oro brilas eĉ en koto. 17. Fremda propraĵo ne utilas. 18. Bone estas tie, kie ni ne estas. 19. Pli bone estas havi paseron en manoj, ol grupon en ĉielo. 20. Ne loko (ofico, rango, profesio) ornamas homon, sed homo ornamas lokon. |
|---|--|

M. S. Rakitski.



KRONIKO.



El Belgujo.

— En la stenografia gazeto »*La Sténographe Populaire*« estas denove komencata serio da bonaj artikoloj pri Esperanto. Nia fervora samideano s-ro L. Dudicourt, direktoro de la nomata gazeto, promesis, ke li konstante daŭrigos rekomendi nian lingvon.

El Bohemujo-Moravujo.

— Nova Societo Esperantista estis fondita en Brno, sub la nomo »Unua Societo de l' Aŭstrujaj Esperantistoj«. Oni sciigas nin, ke 40 membroj tuj aliĝis. La prezidanto de la Societo estas s-ro redaktoro Karl Pelant, vicprezidanto Jos. Černil, sekretario Václav Kovanda, vicsekretario Jul. Kramolišova, kasisto Joh. Kajš, vickasisto Karl Drexler, bibliotekisto Jos. Valíček, vickomitatoj Ad. Kajšová kaj Jos. Chlup, revizoroj Meth. Klimeš kaj Rob. Kelner. Enskriba pago estas 50 heleroj, semajna kotizaĵo 5 heleroj. — Adreso de l' Societo: »Brno (Moravujo), Jusova ul. 8.«

El Francujo.

— La rezultato de la 2-a Konkurso Literatura, aranĝita de la S. p. p. Esp., estas publikigata en la julia numero de »L' Espérantiste«. La komitato de la Societo, Juĝantaro por la 2-a Konkurso Literatura, aljuĝis la premiojn sekvantajn:

Sekcio honora.

Unu Honora Premio estis anoncita por tiu sekcio; pro la granda merito de ĉiuj konkurantoj entute en tiu sekcio, la Juĝantaro opiniis, ke estas bone rekompenci ĉiujn per specialaj medaloj memoraj.

Honora premio: s-ro S. Meyer, pro »L' Avarulo« (traduko de la komedio de Molière, *L' Avare.*)

Medalo el arĝento: fr-ino Hilda Cederblad, pro »En la printempo de la juneco«.

Medaloj el bronzo: s-ro Elbèr No, pro »La okulo«; s-ro Axel Hasselrot, pro »Ĉe la ŝanĝo de centjaro«; s-ro Magnus Nordensvan, pro »Malpermesita frukto« kaj »Alp-rozo«.

1-a sekcio speciala.

1-a premio (ex oequo): s-ro Paul Tenneson, pro »La sanulo kredanta sin malsana« (traduko de parto de »*Malade imaginaire*« de Molière) — kaj s-ro K. Boguŝeviĉ, pro »Kozu-Kurpeĉ kaj Bajan-Slu« (kirgiza tradicio popola).

3-a premio: s-ro Ivan Ŝirjaev, pro »Kion faris la helaj steloj?«

Honora cito ekster la ordigo: s-ro Félix Lallement, pro »La standardportisto«.

2-a sekcio speciala.

3-a premio: s-ro K. Boguŝeviĉ, pro »Apud ŝajtanoj«.

La S. p. p. Esp. malfermis sian 3-an Konkurson Literaturan, kies regularo estas legata en la lasta n-ro de »L' Espérantiste«. Ni varme rekomendas al niaj legantoj partopreni en la Konkurso Literatura.

*

— En Dijono antaŭ nelonge kunsidis la VIII-a Kongreso de la Mastro-Presistoj. La prezidanto de l' Kongreso estis nia tre sindonema amiko, s-ro Paul Jobard, kaj li zorgis ke estu enskribita en la programon la demando pri »Esperanto kaj la Presado«. Li mem prezentis sub tiu ĉi titolo bonegan raporton, en kiu li reproduktas la sciencan argumentadon de broŝuro kiun li estis jam antaŭe publikiginta.

Li konkludis konigante al la kongreso la Delegacion por la L. I., li legis ĝian Deklaracion, kiun niaj legantoj konas, kaj li petis de la Kongreso: 1-e ke ĝi aliĝu al la Deklaracio, 2-e ke ĝi elektu unu aŭ kelkajn delegitojn.

Ĉiuj ĉeestantoj aliĝis kaj, unuvoĉe, s-ro Brodard, presisto en Coulommiers, kaj s-ro Prieur, presisto en Puteaux, estis nomitaj delegitoj.

*

— Preskaŭ en ĉiu n-ro de »*La Plume Sténographique*« (redaktoro s-ro F. Canet en Limoges) estas enpresita malgranda artikolo pri Esperanto kune kun ekzercekzemploj.

El Holando.

— S-ro Dreves Uitterdyk, en urbo Hilversum, sciigis nin, ke lia lernolibro, pri kiu ni parolis ankaŭ en nia antaŭa numero, estos preta espereble en monato oktobro de tiu ĉi jaro.

El Hungarujo.

— **La lernolibro hungara.** S-ro Abel Barabás, la verkinto de la lernolibro hungara, en urbo Kolozsvár, skribas al ni, ke li decidis plimalkarigi sian lernolibron, por ke li ankaŭ per tio ĉi pli efike antaŭhelpu la disvastigon de nia lingvo en Hungarujo. Li vendas la libron por 2.40 kronoj anstataŭ la originala prezo (4 kronoj). Ni varme rekomendas al niaj hungaraj samideanoj konsideri tiun ĉi laŭdindan fakton, kaj ni esperas, ke ili laŭforte agados en la laboro de l' disvastigo de Esperanto, kiu jen — dank' al s-ro Barabás — estas nun plifaciligita. — Adreso: Barabás Ábel ur, az »Ellenzék« belső dolgozó-társaság, Kolozsvár.

*

— La administranto de nia gazeto tradukis la rakonton de M. S. Rakitski »Du renkontiĝoj« el la n-ro 10—11 (1900) de L. I. kaj ĝin presis la gazeto »*Tol. uamegyei Közlöny*«

en sia 31-a n-ro, kun la rimarko, ke ĝi estas originale verkita en lingvo Esperanto kaj estis enpresita en la »Lingvo Internacia«.

El Rusujo.

— **Propagandan broŝuron por estoj** eldonis s-ro J. H. Vaňtrik en Reval. — La verko portas la N^{ron} 145 de l' literaturo Esperanta.

*

— S-ro Vitold Tenisov skribis al ni leteron el Ĥinuĵo, kie li partoprenis en la militado. Ni citas el lia letero la sekvantan:

»Malgraŭ batalaj okupoj mi trovis sufiĉe da tempo propagandi nian karan lingvon kaj trovis multe da personoj kiuj promesis ĝin ellerni.

Inter aliaj estas unu mongolo — s-ro Dondub Unibairov, — kiu estas tradukisto de ĥina kaj mongola lingvoj ĉe unu el la rusaj generaloj. Li estas klera junulo kiu ricevis edukon en S.-Peterburgo. Hodiaŭ mi sendas al li rusan lernolibron Esperantan.«

—**—

El Esperantujo.

— La novfondita »Unua Societo de l' Aŭstrujaj Esperantistoj« en Brno uzas propagandajn kovertojn belepresitajn, kiuj portas la adresan surskribon de l' Societo kaj malgrandan sciigon pri Esperanto, en lingvoj bohema kaj germana. — Apenaŭ naskiĝis tiuj ĉi kovertoj, ili jam havas historion. Kiel kuriozon ni citas, ke nia fervora amiko Václav Kovanda, sekretario de l' Societo skribas al ni, ke la Brna poŝtestro »ne volas permesi uzi *reklamon (!)* sur la koverto« . . . Ni tre dubas, ke en Moravujo estus malpermesite uzi tiajn kovertojn, ĉar ni ne konas intime la tiean poŝtan regularon. Ĉu la sinjoro poŝtestro eble pli bone konas ĝin . . .



SinJORINO Teofilo.

SinJORINO Teofilo estis flavruĝa katino, kun blanka brusto, rozkolora nazo kaj bluaj pupiloj. Ĝi estis tiel nomata, tial ke ĝi vivadis tute intime kun ni. Efektive ĝi dormis sur la malsupro de nia lito; sonĝetis sur la apogo de nia seĝo, dum ni skribadis; malsupreniris en la ĝardenon por sekvi niajn promenadojn; alestis al niaj manĝoj, kaj tiam subkaptetis iafaje la pecon, kiun ni portis de la telero al nia buŝo.

Iam, unu el niaj amikoj, forironte por kelkaj tagoj, komisiis nin gardi kaj flegi sian papagon, dum li forestus.

La birdo, ekscitita pro la ŝanĝo de loĝejo, supreniris per sia beko ĝis la supro de sia sidiĝilo, kaj, videble tre terurigita, ĉirkaŭturnis siajn okulojn similajn je najloj de apogseĝo, sulkigante la blankajn haŭtetojn, kiuj ĉe ĝi anstataŭas la palpebrojn.

SinJORINO Teofilo neniam estis ekvidinta papagon, kaj tiu ĉi besto, pro la noveco, ĝin videble surprizis. Tiel senmova, kiel egipta kato per rezinoj konfita en reteto da rubandetoj, ĝi rigardis la birdon, ŝajnante pripensi profunde, por ke ĝi al si rememorigu ĉion kion ĝi estis sciiĝinta pri la zoologio, trakurante la tegmentojn, la korton, la ĝardenon.

La ombro de ĝiaj pensoj trapasis ĝiajn ŝanĝemajn pupilojn, kaj ni povis tie legi jenan rezultaton de ĝia ekzameno:

»Ĝi estas ja verda koketo.«

Pri tio certigite, la katino eksaltis de sur la tablo, kie ĝi sidis observeme, por iri malrapide loki sin en angulo de l' ĉambro. Ĝi kuŝiĝis por la ventro sur la planko, kun la kubutoj eksterigataj, la kapo mallezata, la risorto de l' spino streĉata. Tiel ĝi similis je la nigra pantero, kiu, laŭ la pentraĵo de Geromio, observas la gazelojn irantajn al la lago por tie malsoifiĝi.

Tiujn ĉi movadojn konsideris la papago kun febra malkvieteco: ĝi ŝveligis siajn plumojn, bruigis sian katenon, levadis unu el siaj piedoj, movetante la fingrojn, kaj akriĝadis sian bekon sur la rando de la manĝkesto. Instinkte ĝi divenis la aleston de malamiko ian malbonaĵon pripensanta. Efektive la okuloj de la katino, alturnataj senmove al la birdo kun altiranta energio, esprimis, per lingvaĵo, kiun la papago tre bone komprenis, kaj kiu cetere estis nenial malklara, la sekvan-tan: »Kvankam verda, tiu ĉi koketo estas videble bongusta manĝaĵo.«

Tiun ĉi scenon ni konsideris interese, pretaĵ interveni, kiam estus bezone. SinJORINO Teofilo alproksimiĝis iom post iom: ĝia rozkolora nazo moviĝetis; ĝiaj okuloj duone fermiĝis, ĝiaj streĉeblaj ungegoj vice aperis kaj malaperis; sur ĝia spino trakuris sulketoj, kiel ĝi okazas al frandemulo, kiu tuj sidiĝos je manĝtablo, antaŭ kokino grasa kaj per trufoj pikita. Ĝi ĝojis je la penso ke baldaŭ ĝi ĝuos ion novan kaj sukplenan. Tiu ĉi alilanda manĝaĵo tiklis ĝian sentamecon. Subite kiel arko streĉita rondiĝis ĝia dorso, kaj per elasta kaj fortika salto falis la besto ĝuste sur la sidiĝilon. Ekvidinte la danĝeron, la papago subite ekkriis per basa voĉo profunda: »Ĉu vi matenmanĝis Jako?« *

Tiu ĉi frazo kaŭzis nedireblan teruron al la katino, kiu eksaltis malantaŭen. Sonaro de trumpetoj, amaso da teleroj disrompitaj teren, pistolpafo plaŭdinte je ĝiaj oreloj ne estus pli krude terurigintaj la beston. Ĉiuj ĝiaj ideoj pri l' ornitologio estis disbatitaj. — »Kaj per kio? — per reĝa rostaĵo«, * daŭrigis la papago. La mieno de l' katino klare esprimis:

* La citaĵoj, signitaj per steleto, estas frazoj, kiujn la papagoj estas kutime instruataj elparoli.

»Tio ĉi ne estas birdo, ĝi estas sinjoro, ĝi parolas!«

»Kiam mi trinkis vinon klaretan,
Ĉio turniĝas, ĉio turniĝas en drinkejo« *

ekkantis la birdo per laŭtsona voĉo vere surdiganta, ĉar ĝi komprenis ke la terurego kaŭzita de ĝia parolpovo estas ĝia plej bona defenda rimedo. La katino ĵetis al ni rigardon

plenan je demando, kaj ne kontentigite de nia respondo, ekiris sub la liton, por sin tie kaŝi, de kie dum la tuta tago estis neeble elirigi ĝin.

La sekvintan tagon, sinjorino Teofilo, iom rekuraĝigite, rean atakon provis, kiu samamaniere estis repelita. — De tiam ĝi restis kvieta, konvinkite ke tiu birdo estas homo.

El *Teofilo Gautier* (Gotie') tradukis

F. Lallemand.



T I K - T A K .

— Laŭmemore tradukita. —

En la hotelon eniris du sinjoroj elegante vestitaj kaj ekpostulis de l' mastro manĝaĵojn kaj vinon. Kredeble, la mastro tre malofte havis la feliĉon akcepti kaj regali ĉe si »tiel eminentajn gastojn«, ĉar li ekrigardis per okuloj scivolaj la du envenintojn kaj komencis kun rapideco malordinara plenumadi la ordonon de ili.

Post unu momento la gastoj jam estis sidantaj ĉe tablo kaj sin regaladis, babilante pri diversaj aferoj. Vino rivere fluis, kaj la servema mastro »frotadis la manojn«, ĝojante pro la profito ricevota.

La gastoj ekdisputis.

— Mi vetas mil frankojn, ke oni ne povas trastari sub horloĝo tutan horon, dirante ĝuste kun ĝi tik-tak kaj konsente kun la pendolo balancante la kapon.

— Jen kia bagatelo! Mi provokas vin, — rediras la alia.

— Nu, donu mil frankojn kiel garantiaĵon.

— Ricevu.

La mastro aŭdanta tiun ĉi interparoladon tre ekinteresiĝis pri tio ĉi. »Ricevi pro tia

bagatelo mil frankojn!! Ĉu mi ne povas fari ĝin?!« Kaj li ĉe l' fino de tiu ĉi interparolado aliris al la tablo.

— Min tre ekinteresis via veto: kial oni ne povus trastari tiamaniere? Mi certigas vin, ke mi precize faros ĝin. Permesu al mi.

— Bone. Metu do sur la tablon mil frankojn.

La hotelestro tuj plenumis la postulon de l' gasto.

— Ankoraŭ unu vorton. Vi devas dum via starado nenion paroli, kion ajn oni diros aŭ faros antaŭ vi.

Ĝuste kontraŭe al la tablo sur la muro troviĝis horloĝo. Sub ĝin tuj stariĝis la mastro kaj komencis la elplenumadon de l' vetaĵo.

Kaj la »eminentaj gastoj« daŭrigis manĝi kaj drinki, ridante kaj disĵetante ŝercojn por la hotelestro. Ili faradis diversajn gestojn trompantajn, penante igi lin ekparoli. Sed ĉio estis vana. La mastro estis netrompigebla kaj, kvazaŭ nenion rimarkante, li daŭrigis staradi kaj tik-takadi ĝuste kun la horloĝo, balancante konsente kun la pendolo la kapon.

Tiel estis pasinta plena duonhoro.

Enfine, la gastoj komencis dividi inter si la mil frankojn, kiujn estis metinta sur la tablon la hotelestro, kaj kaŝis ilin en siajn monujojn. »Ne, vi vane esperas, vi ne trompigis min!« — parolis al si la mastro. Iom poste, unu el la gastoj ekleviĝas, prenas sian ĉapelon kaj, nenion dirante, foriras.

Malgraŭ ĉio ĉi la hotelestro daŭrigas staradi kaj tik-takadas akurate, restante ĉiam muta kiel fiŝo.

Post la unua leviĝis ankaŭ la dua gastoj kaj sammaniere estis foririnta.

La edzino de l' hotelestro, kiu estis en la apuda ĉambro, infine, estis kompreninta la komedion ludatan de la » eminentaj gastoj«, en kiu ŝia edzo estas plenumanta la rolon tiel ĝeneralan, kaj ŝi komencis admoni la edzon

ke tiu ĉi ĉesigu sian arlekenajon kaj kaptigu la ĉarlatanojn, kiuj estas trompintaj lin profitante lian simplecon. Sed li nur eksvingis la manon, silentigante ŝin kaj petante ke ŝi ne malhelpu al li finigi sukcese la vetajon.

— Ho, malsaĝulo! — ekkriis la malfeliĉa virino, — ĉu, efektive, vi volas ellasi la friponojn?

Nun restis ankoraŭ nur dek minutoj ĝis la plena horo. — »Tik-tak . . . tik-tak . . .« — daŭrigis la mastro, balancante la kapon.

Sed jen estas ĝuste tuta la horo. Li finis kaj, kvazaŭ rekonsciiĝinta, elflugis el la ĉambro, vokante la » eminentajn gastojn«. Sed tiuj kunpreninte la monojn, kompreneble, malaperis kaj, kvazaŭ droniĝis en akvo.

K. Boguŝeviĉ.



MI EKVIDIS ŜIN . . .

Mi ekvidis ŝin, kaj najtingalo
Tuj ekkantis en koro de mi,
Sed de ŝia glacia rigardo
Baldaŭ en mi naskiĝis skorpi'.

Ha, ĉi tiu skorpio englutis
La sonoron konsiston de l' kor'
Kaj enloke de gajmelodio
Nun aŭdiĝas mizera stertor'.

Kaj mi pensas, dronante en maro
Da malgaj' kaj da kora sufer':
Kiu estis kreint' de l' edeno
Estis ankaŭ kreint' de l' infer'.

Amiko.



HELENO.



(De Henry De Forge.)

I.

Mia Patro,

Mi skribas al vi por demandi vin, respekte, ĉu vi permesas al mi repreni mian lokon sub via tegmento.

De tri jaroj mi foriris, de tri jaroj mi ĉesis esti miksitaj kun via vivo. Vi ne forpelis

min el la domo, sed estis inter ni grava kaŭzo de malkonsento. Mi ne volis vin devigi akcepti ion, kiun vi rifuzis kaj mi uzis la liberecon kiun vi lasis al mi por vivadi laŭ mia volo.

Hodiaŭ tiu ĉi kaŭzo de malagordo ne estas plu kaj mi kuraĝas nun vin peti ke ni reprenu la komunan vivon.

Mi scias ke vi suferis, tre suferis pro mia malalesto, ĉar vi amis min per tuta via patra kareseco, ĉar mi estis por vi ĉiam, malgraŭ miaj dudekkvin jaroj, la »benjamino«, la malgranda infano de pasinta tempo kun gustoj strangaj kaj kapo malprudenta.

Vi eĉ konvinkigis ke mi neniam taŭgos por io bona, kaj estis bedaŭrinde, vi diris ofte, esti tiel multe peninta por fariĝi la viajn riĉaj, tre riĉegaj, kaj vidi min perdi tiel mian tempon, detrueti mian junecon, ne havante ian seriozecon nek en la animo nek en la koro.

Kaj kiel kronaĵo de tiu nekorektebla ekzistado de nelaborantulo kiun mi vivis, la sorto volis ankoraŭ ke baro staru inter ni, nomo, mizera virina nomo, nur unu nomo, sed kiu tamen vin tre kolerigis, kaj por la unua fojo, devigis vin diri al via filo maldolĉajn parolojn.

Mi vidas vin ankoraŭ, stare en via oficejo, la vizaĝon ŝvelitan je sango pro la ekscito kiu ĉirkaŭprenis vin, la manojn tremantajn. Mi staris senmove antaŭ vi kaj aŭskultis trankvilege tiujn parolojn, kiuj estus devintaj terurigi min.

Vi parolis pri honoro, pri familio, pri mono, kaj mi ne scias ankoraŭ pri kio. Vi diris al mi la ciferon da milionoj kiun vi estis akirinta, la titolojn de viaj antaŭuloj kaj la glorecon de via rilataro. Vi ĵetis sur mian vizaĝon ke mi baraktis sur ĉio tio pro kaprico ridinda, pro aventuro de gazetromano.

Unu momenton, post esti parolinta al mi severe, vi provis ridi, je rido kiun mi aŭdas ankoraŭ, poste vi fariĝis karesanta, preskaŭ peteganta, kaj, post du grandaj horoj vi tute koleriĝis; mi, je mia flanko, foriris eĉ nenion respondante.

Dum tri jaroj vi ne vidis min. Mi scias ke vi diris al multaj personoj ke mi jam ne ekzistas por vi, kaj al kelkaj aliaj ke vi ĉagreniĝas multe.

Hodiaŭ mi revenas, patro mia, mi revenas, sed antaŭ ol mi estos transirinta vian sojlon, mi diras al vi: »Jam ne timu, ŝi mortis!«

Jes! ŝi . . . Heleno Fortier, la malriĉa knabino al kiu mi donis mian nomon, vian nomon de milionriĉulo, kaj por kiu mi faris tion, kion vi nomis la plej grandan el kulpoj.

Heleno Fortier! tiu ĉi nomo ŝajnis al vi kiel nenion bonan signifanta, ĉu ne vere? Via komisiato, ordonita de vi por sekvi ŝiajn paŝojn, rakontis al vi pri ia knabino pala kaj nenion posedanta, apenaŭ beleta kaj neniel feliĉa.

Ŝi havis nek nomon nek monon. Ŝia familio mem estis ĉirkaŭita de ia mistero kiu maltrankviligis vin. Ĉio tio ŝajnis ankoraŭ multe pli grave, kiam via spiono eltrovis ke la sinjoro Fortier, ŝia patro, estis en malliberejo pro trompŝtelo. Koncerne sinjorino Fortier, estis pli bone nenion paroli!

En kia mezo — Dio granda! — estis vivinta tiu ĉi knabino. Tiuj personoj iam estis estintaj en la komforto, sed la patro estis perdinta eĉ sian lastan centimon, kaj Heleno vivadis sola en la plej malhelega mizero, mortigante sin per laboro por povi manĝi. Ĉiuj tiuj sciigoj estis tre malgajigantaj, ĉu ne vere? Kaj el viaj lipoj mi ekaŭdis la vortojn »honto« kaj »mizerloĝetejo«.

Mi tamen foriris kun tiu ĉi knabino.

Tio estis preskaŭ forpreno, preskaŭ hontigo.

Ni edziĝis sen atestantoj, sen iu, kaj ni forkuris en landojn malproksimajn.

Eble vi min malbenis, patro mia, eble vi kredis ke mi freneziĝis!

Nun aŭskultu min: mi tuj diros al vi kion mi faris!

II.

Jes! Heleno Fortier estis nur malriĉa laboristino, kun okuloj ĉirkaŭkavitaj per la febro, kun vangoj palaj, kondukanta mizeran vivadon. Jes! ŝia patrino ne estis inda je respekto kaj ŝia patro estis en malliberejo. Jes! fine, tiu knabino loĝis forlasita en mizerloĝetejo, — vi estis prava kiam vi elparolis tiun vorton, — mortanta pro malsato kaj mortanta ankaŭ

pro malgajeco, ĉar ŝi povis nenion esperi pri tio, kiu feliĉigas la aliajn . . .

Kaj la okazo, unu el tiuj okazoj misteraj kvazaŭ senditaj de diaĵo, renkontigis tiun mizerulinon kaj tiun milionriĉulon.

Mi estis nur nenionfarantulo, nelaborantulo kaj mi rigardis unue tiun knabinon kiel ĝentilan aperon, renkontitan ĉe l' angulo de ia vojo. Kion ja ŝi estus farinta en mia vivo? Kion ŝi estus farinta de mia mono kaj kial ŝia nomo makulita estus malpuriginta la mian?

Mi estis feliĉulo de la mondo ja! Mia loko ne estis apud la ŝia! Mi ne devis pro ia kaprico, eble nedaŭrebla, difektigi tiun vivadon, kiun vi estis farinta por mi.

Poste, ian vesperon, mi min vidas ankoraŭ kvazaŭ mi nun estus tie, reveninte hejmen el dancejo, mi apogigās sur la malfermita fenestro en mirinda aprila nokto kaj mi revis.

Mi ĵus estis vidinta proksime multe da fraŭlinoj, kaj mi estis havinta tiun kruelegan senton ke mi ne povos trovi en neniu el ili iom da vera kareseco, nek iom da sincera feliĉo. Ŝajnis al mi ke ĉiuj viglis mian riĉecon, tiujn milionojn kies la precizan ciferon ili kalkulis, kaj de mia flanko mi ne povis kuraĝi, eĉ por provi, doni al ili iom da ameto.

Jes! mi estos ĉiam nur sentaŭgulo kaj tiu ĉi penso terurege mordetis mian koron. Mi estos nur via malinda filo, malkapabla je ia nobla ago.

Tiam, tiun vesperon, patro mia, mi pensis pri tiu knabina, modesta, malriĉa, mizera kaj kiu amis min. Mi komprenis ke en ŝi mi renkontos sinceran karesecon, ĉar mi estos farinta iom da feliĉo.

Mi iris al ŝi; mi demandis ŝin ke ŝi akceptu esti mia edzino, ke ŝi ŝanĝu sian mizeron por mia riĉeco, sian solecon por nesto de amo.

Ŝi ekploris, poste diris al mi:

— Vi forgesas mian patron.

— Kontraŭe! Tio estas kaŭzo vin ami plu.

Kaj tiam ŝi konis ĉiujn tiujn ĝojojn, kiujn ŝi kredis forflugintajn por ĉiam. Ŝi fariĝis riĉa, ŝi fariĝis adorata, ŝi fariĝis feliĉa. Mi pagis la ŝuldojn de ŝia patro kiu reeniris en la regulan vivon kaj mi faris de tiu virino la plej ĉarman edzinon. Dum kelkaj jaroj, ni vojaĝis laŭ niaj kapricoj, sen loĝadejo difinita, sen io kio ligis nin kun la lokoj krom ilia propra ĉarmo, forgesante ambaŭ la vivon, ĝiajn malĝojecojn kaj ĝiajn konvenojn.

Ŝi amis min kiel mi amis ŝin, mi havis tiun plezuregan ĝojon, kiun ne havas la aliaj, senti ke ĉio kion mi faris, ĉio kion mi diris, estis por tiu malfeliĉa knabino la efektivigo de revo kiun ŝi estis kredinta neeban.

Tio estis mia bona ago, la mia, patro mia, mia respondo pri la kulpigo, je kiu oni min estis ŝarginta, esti nur senutilulo en la vivo. Mi estis farinta pli bone ol gajni monon, ol fariĝi glora, mi estis feliĉiginta virinon.

Nia feliĉo daŭris tri jarojn. Ian vesperon Heleno kviete estingiĝis dankante min, en mezo de ia lando ravanta kiun la suno neniam forlasas.

Jen tio, kion mi deziris diri al vi, patro mia, antaŭ ke mi revenu hejmen, kiel la infano malŝparema. Mi neniam reparolos pri la mortinto.

Ĉu vi volas akcepti min?

Tradukis el franca lingvo

Grupeto Esperantista de Samoëns.



CIVILIZACIO.

La sinjorino Civilizacio! Oni ne devas prezenti al si, ke ŝi estas malpeza aersimila virino kun okuloj plenaj je moleco, boneco kaj amo. Ŝi amas ŝajni tia, sed ŝi estas tute alia. Ŝi estas virino-pafilego. En ŝia saketo estas kaŝita revolvero kaj en la bela skatoleto — kugloj dum-dum. Ne pensu, ke ŝi serĉas en la skatoleto ĉokoladan pastelon, ŝi serĉas kuglon, por enigi en vian frunton.

Ŝi venas al nekultura homo kaj diras:

— Vi plaĉas al mi. — La nekultura homo faras saluton kaj respondas:

— Mi dankas vin, sidiĝu, mi petas.

— Mi deziras fari al vi ion bonan.

— Mi dankas, sed mi nenion bezonas; mi estas kontenta je tio, kion mi havas.

— Ne, ne, mi faros al vi ion bonan. Kia estas via loĝejo?

— La domo estas bona por mi; tie ĉi loĝis mia avo kaj mia patro. Ĝi plaĉas al mi.

— Ho, ne! oni devas detruigi ĝin kaj bruligi.

— Sed, mia sinjorino . . .

— Silentu, ne malhelpu al mi fari bonon.

Kia abomenaĵo staras tie en la angulo?

— Tio ĉi estas mia dieco, antaŭ kiu mi preĝas.

— Oni devas ĵeti ĝin en la kloakon. Tio ĉi estas superstiĉo. He, kiom da mono vi havas? Fordonu ĝin al mi.

— Sed mi ricevis ĝin per mia laboro.

— Vi tute nescias, kiamaniere oni devas uzi ĝin. Mi aĉetos al mi por via mono diversajn bonajn objektojn. Vi vidis ilin kaj poste, kiam vi denove havos monon, vi aĉetos ankaŭ al vi tiajn samajn objektojn. Mi decidis okupi min per via sorto. Mi sendos al vi miajn amikojn, kaj ili instruos vin en ĉio.

— Amikojn! — diras kun malespero la nekultura homo.

— Jes, jes, ili estas tre kulturaj.

— Ho sinjorino, mi dezirus vivi sen ili.

— Ho, vi ne scias, kiel amindaj ili estas!

Por ekzemplo, sinjoro Smith estas tre energia homo. Lia patro estis ankaŭ tre energia, li faris komercon de sklavo. Tiu ĉi okupo postulas grandan kapablon. Sinjoro Smith ĉiam nutras en sia kapo grandiozajn projektojn. Li havas tre delikatan guston kaj tre vastajn bezonojn. Mi estas certa, ke al li plaĉos ĉio, kion vi havas. Li neniu lasas preteriri sen eltirante el li profiton. — Sinjoro Auteuil de Longchamps ankaŭ estas bonega juna homo. Al li estos utile vojaĝi al vi. Li vivas en Parizo tre distrite; li malgajnis ĉion, kion li havis, eĉ ĉion, kion li havos iam. Li aldonis sin al iaj neordinaraj malvirtoj. Li devas freŝigi sin. — Sinjoro Müller estos ankaŭ ĝoja, se li trovos rifuĝon ĉe vi. En sia patrujo li ĉirkaŭrabis du homojn, unu mortigis, kelkajn ĉirkaŭŝtelis, sed en esenco li estas bona homo. Li ne havas lokon en sia patrujo kaj volonte koloniigis ĉe vi. — Sinjoro Ivanov ankaŭ estos al vi utila en la aranĝo de via mastrajo. Li havis tri bienojn kaj ĉiujn ruinigis. Li perdis tiel multe, en sia propra mastrajo, ke, sendube, nun bone aranĝos vian. — Sinjoro Luiĝi estas ankaŭ bona homo, sed tute ne povas aranĝi siajn aferojn en la patrujo. — Tiuj ĉi amindaj homoj civilizos vin. Sed ili estas homoj junaj, vivaj. Vi devas fermi la okulojn kaj ne rigardi iliajn rilatojn al via virino kaj filinoj. — Komprenoble, al vi estos necese fari ne tion, kio plaĉas al vi, sed tion, kio plaĉas al miaj civilizitaj amikoj.

— Sed, sinjorino, mi tute ne deziras esti civilizita.

— Sed la civilizita vivo alportas feliĉon.

— Mi ne deziras esti feliĉa.

— Kio? vi ne volas esti feliĉa? Vi devas esti feliĉa!

— Sed mi ne deziras.

— Silentu, maltaŭgulo! . . .

Sekvas bona bato.

— Pro kio do vi batas min?

— Mi devigos vin esti feliĉa.

Ankoraŭ kelkaj batoj. La Civilizacio renversas la malfeliĉan nekulturan homon sur la plankon, batas per la piedoj kaj diras:

— Ĉu vi sentas vin feliĉa?

— Mi sentas! mi sentas! — ĝemas la malfeliĉulo.

Poste li renkontas kulturan homon.

— Kio fariĝis el via vizaĝo? — demandas la lasta.

— Ĉe mi estis la Civilizacio.

— Ĉu ŝi plaĉis al vi?

— Mia flanko doloras pro tiu ĉi Civilizacio: ŝi rompita al mi du ripojn.

— Tio ĉi ne povas okazi: ŝi estas tre delikata sinjorino.

— Ŝi elbatis al mi ankaŭ unu okulon kaj rompita la manon.

— Ŝi estas tiel bona.

— Jes, bona; ŝi elbatis al mi ĉiujn dentojn.

Ĉu ekzistas du civilizacioj? Ne, nur unu, sed ĝi, kiel medalo, havas du flankojn. La nekulturaj homoj ĉiam vidas nur ĝian returntan flankon. Ili vidas plejparte tiujn homojn, kiuj ne povas aranĝi sin en sia patrujo, tiajn instinktojn, kiuj ne povas esti montrataj tie ĉi, la avidecon, kiu ne povas esti kontentigita dome. Sed tie, malproksime, en la libereco, la eŭropano elmontras ĉion, kion li tie ĉi kaŝas, kaj en la rilatoj al nekulturaj popoloj li estas la plej nekultura homo. Bridi ilin! estas devizo de la tuta Eŭropo. Sed post la brido de l' nekulturaj homoj, Eŭropo devas bridati ankaŭ siajn kulturportantojn. Kio fariĝas nun en Ĥinujo, estas nur la komenco de tiu movado, kiun elvokas en tiu ĉi lando nia civilizacio, montrata nur de sia malbona, kruela, senkora, barbara flanko.

(El libro de Amfiteatrov kaj Doroŝeviĉ.)

Tradukis V. Laskin.



SE VI, MIA DOLĈA . . .

La rozoj babilas, la luno ridetas,
Kaj murmuretadas l' aer',
Viviĝas fantomoj, korpigigas fabeloj
Kaj vaĝas kun mi sur la ter'.

Meznoktaj himeroj kaj sorĉaj neebloj
Elfluas el la ĉielmez'
Kaj al mi portiĝas kaj volas plenigi
La cerbon de mi kun frenez'.

Mi pensas ke ili atingus la celon
Se vi, mia bela knabin',
Se vi, mia dolĉa, ne estus delonge
Metinta frenezon en ĝin.

Amiko.

TURNATA FABLO.

— Nun, — diris Granda Cervo al sia plej maljuna Cerveto, — mi al vi montros vidaĵon kiun neniam vi vidis antaŭe kaj de kiu mi estas tiel fiera, ke mi volus promenadi per miaj malfrontaj piedoj dum la tuta cetero de mia vivado.

— Ho, — diris la cerveto, — ĝi estas viro. Ĉu estas eble?

— Jes, — diris la fiera parenco de la cerveto, tirinte el post arbo korpon, — kaj nun, kiel bona cerveto, kuru kaj alportu mian plej akran tranĉilon, kaj mi distranĉos la haŭton kaj preparos la kapon por manĝoĉambra ornamo. Kaj ĉu mi al vi rakontu kiel via pat-

roĉjo faris tre kuraĝan agon? Aŭskultu do, mia filo. Hodiaŭ matene, kun miaj hundoj, mi sekvis tra la arbaro la piedsignojn de viro, ĉasis lin en lagon, antaŭe eksciiginta ke li ne havis pafilon, kaj do, dum li naĝis preskaŭ tute malfortiginta, en mia ŝipeto mi lin proksimiĝis kaj lin mortigis, malgraŭ li min petis ke mi lin permesu vivi.

Moralo: — Sed, patroĉjo, — diris la cerveto, — la viro ne havis ian rimedon kontraŭ via lerto kaj forto. Mi ne vidas ion bravan aŭ fierindan pri tio.

— Sed vi ĝin vidis, — diris Granda Cervo, — kiam vi estiĝos tiel grandaĝa kiel mi.

Tradukis

Edward L. Steckel.



AFORISMOJ KAJ PRIPENSOJ.

De l' Markizo de Maricá.

La diferenco inter la seksoj produktas ilian kunligon.

Ni nin ŝajnigas forgesitajn, kiam ne konvenas al ni ŝajni memoritaj.

Ĉiuj reklamas reformojn, sed neniu volas sin reformigi.

Malsaĝeco kaj malriĉeco venas al ni senpage; ili kostas nek laboradon nek elspezon.

La patriotoj diras laŭtege ke estas dolĉe pro patrujo morti, sed mallaŭte ili estas konvinkitaj ke estas pli dolĉe vivi por ĝi, kaj el ĝi.

La plena libereco estas kiel la ŝtono filozofa: serĉita de multaj, kaj eltrovita de neniu.

La vivo homa estus neelportebla, sen la iluzioj kiuj ĝin ĉirkaŭas.

Nia propramo estas la kaŭzo kaj deveno de ĉiuj la amadoj: ni amas nur pro amo al ni mem.

La laŭdo ne meritita ebriigas kvazaŭ la vino.

Estas personoj kies vangoj eble estas ruĝigitaj de l' suno, varmo, malvarmo aŭ de l' alkoholtinktaĵoj, sed neniam de l' honto.

La morto de avarulo egalvaloras je l' eltrovo de unu trezoro.

La amo, kiel la infanoj, komencas per ludoj, kaj finiĝas per ploroj.

La najtingaloj mutiĝas, kiam la azenoj eblekas.

La plej belegaj floroj ne estas la plej parfumplenaj, nek estas la plej vidbelaj la birdoj kiuj plibone kantas.

La fantazio estas la lanterno magia de nia animo.

Estas granda maljusteco kondamni la babilegdon de la virinoj: konsideri ke, sen ĝi, la infanoj neniam lernus paroli.

Estas tiel natura la diverseco pri la opinioj ĉe la homoj, kiel estus eksterordinara kaj neklarigebla ilia unuformeco.

La mondoj sin movadas en la oceano grandega de l' etero, kiel la balenoj naĝadas tra la vastaj maroj de la tero.

Tradukis *A. Caetano Coutinho.*



RAKONTAĴO MARSEJANA.

Antaŭ nelonge, daŭrante tagon de la juna monato, ĉirkaŭ je la sesa horo vespere, Marius, la tipo de la Marsejanoj, sidis en antaŭo de kafejo de la strato Kanebiero* ; li legis journalon, preparante tre zorge absintglason.

Dume bela hundo de la gento »Mouton« ** alvenas kaj sin kuŝigas proksime al la piedoj de nia Marsejano.

Post iom da tempo, el multaj promenantoj, hundtondisto, manovrante per siaj fingroj grandan tondilon, haltas kaj ĝentile al li petas :

— Ĉu vi permesas al mi, sinjoro, ke mi tondigu tiun ĉi amindan beston ?

Marius rigardas neatente la interparolanton, meditas dum malgranda momento, kaj, kun mokiga rideto, respondas :

* *Kanebiero* = la plej granda strato de la urbo Marsejo.

** *Mouton* = la hundoj de la gento »Mouton«, tiel vestiĝas kiel la ŝafoj (*Moutons*).

— Volonte, kun plezuro ; — kaj li daŭrigas la legon de la gazeto, trinkante la verdlikvoron per maloftaj enhavbuŝetoj.

La tondisto kaptas la hundon, ĝin karesas, ligas la kruojn al ĝi kaj per sia ilo kr-kr-kr tranĉas la nigran lanon de la besto.

— Ĉu vi volas, sinjoro, ke mi faru al ĝi la bukedojn sur la kapo, la dorso kaj la vosto ?

— Faru la bukedojn, — diras malatente Marius.

Post tiu ĉi respondo li enpoŝas sian journalon kaj sin amuzas rigardi la diverslandajn vizaĝojn pasantajn antaŭ liaj okuloj.

Iom post iom la suno malaperas, la promenantoj malmultiĝas, sonoras la horo de la vespermanĝo ; kaj la tondisto liberigante la nudan hundon :

— Sinjoro, vi ŝuldas al mi du frankojn.

— Mi ŝuldas al vi nenion, tiu ĉi hundo ne apartenas al mi ; — kaj, paginte sian absintglason Marius foriris, lasante la tondiston tute ek miregan.

P. Tourrette, en Dragnignan.

DIVERSAĴOJ.

Adresaro de niaj abonantoj.

(Novaj aliĝoj.)

Aŭstrujo :

Franz Prádný, adr. Isaac Maŭtner & Sohn, en Náchod (Bohemujo).

Francujo :

Théophile Cart, profesoro, 12, rue Soufflot, en Paris 5^e.

J. Sabatier, 233, rue St. Martin, en Paris.
Moreau-Voillot, komercisto je vinoj, en Beaune, (Côte-d' Or).

Holando :

Dreves Uitterdýk, Trompschool, en Hilversum.

Rusujo :

Tvelkmejer, en Ĉernigovka, Primorskoj oblasti.
Ŝia Admirala Moŝto Maria Nikolajevna sinjorino de Ĉuhnin, en Vladivostok.

N. V. Bujlov, daĉa Vitmera, na melnicu, en Pavlovsk, S.-Peterburgskoj gub.

Svedujo :

Viktor Betulander, Svartensgatan 8, en Stockholm.

Informejo de esperantistoj.

Baldaŭ mi revenos al miaj parencoj kaj tiam mi renovigos la korespondadon kun miaj Geamikoj-Esperantistoj kaj sciigos ilin pri mia adreso kiu nun eĉ al mi estas nesciebla.

Mian koran saluton al miaj Amikoj mi sendas el la malproksima Ĥinujo.

V. Tenisov, Esp-o 3802.

S-ro Waclaw Woyde (E. 3984) petas, ke oni adresu al li sekvante: »S-ro Waclaw Woyde. *Warszawa* (Polujo), ulica Zurawia 34.«

oo

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Mi estis sendinta al vi por presigo mian tradukon de la versaĵo de A. Majkov sub la titolo »Menisko«, kiam mi rimarkis, ke unu verso neprecipe tradukita povas esti tradukita pli bone. Mi tre petas Vin korekti tiele: la frazon »... Mortinton englutis la maro« anstataŭi per la frazo »... Li estis nutrita per maro«. Tiu ĉi ŝanĝo ĝuste esprimas la penson de l' poeto. Eble inter la abonantoj de L. I. estas amantoj de muziko vokala; por la scio de ili, mi opinias, ne estos superflue komuniki, ke por la rusa teksto de la versaĵo de Majkov ekzistas muziko (muzikaj notoj), verkita de l' glora rusa komponisto s-ro Cezar Kuj (vendado en ĉiuj muzikmagazenoj de Peterburgo). Mia traduko estas farita konforme al la muziknotoj, tial oni povas kanti la verkon de C. Kuj kun Esperanta teksto.

Kun plena respekto

A. Fjodorov.

HUMORAĴO.

Li ne havas malamikojn.

Katolika misionario predikinta inter sovaĝuloj-hommanguloj; admonis la mortigantan estron de enlanda gento, ke li pentu kaj kristanigu antaŭ la morto, por eviti la eternajn turmentojn en la postĉerka vivo.

— Sed kion mi devas fari por tio? — demandis la glora hommangulo.

— Vi devas pardoni per tuta via koro al ĉiuj viaj malamikoj.

— Mi... ne havas nun... malamikojn, — respondis la estro.

— Kiel povas tio ĉi esti? — ekmiris la misionario.

— Mi... ilin... — stertoris la mortiganto, — ĉiujn... formangis.

F. Postnikov.

Solvo.

— La kuracisto ordonis, ke mi kaj mia edzino trinku vinon kun akvo.

— Vi certe plenumas tion ĉi.

— Ho jes; mi trinkas vinon, mia edzino trinkas akvon.

Profito.

Oni dungas somerloĝejon.

— Ĉiuj ĉambroj estas mallumaj.

— Jen tio ĉi estas bone, sinjoro: vi povos dormadi la tutan tagon.

Eksterordinara ĉasanto.

La edzino: Vi alportis mortigitan leporon. Sed kiamaniere vi povis mortigi ĝin, forgesinte vian paŝilon hejme?

La edzo: Jes, mi sentese estis sentanta, ke ĉe mi io malestas.

K. Ŝidlovskij.

Ruza.

La sinjoro (al la almozulo): Hodiaŭ tagmeze vi povas veni al mi por tagmanĝi.

La almozulo: Mi preferus veni morgaŭ tagmeze, se via sinjora moŝto ne havas ion kontraŭan.

La sinjoro: Bone, venu do morgaŭ. — Ĉu eble iu invitis vin por hodiaŭ?

La almozulo: Jes, via estimata edzino havis la bonecon...

Diferenco.

Kuiristino diras al la sinjorino, kiu trovis ortografian eraron en la kuirlibro: »Jen, via sinjorina moŝto, la diferenco inter ni: vi scias kiel skribi, — mi scias kiel kuiri.«

Fiereco.

Vizitanto (al la riĉega bankiero): Viaj ĉiuj ok filinoj estas do jam edziniĝintaj...

La bankiero: Jes, sinjoro, — ŝajnas ke mi ne povas havi sufiĉe da filinoj.

Feliĉo.

— Vi ne estas plu resanigebla.

— Eĉ tiam ne, sinjor' kuracisto, se mi ĉesus la drinkadon de brando?

— Ne, eĉ tiam ne.

— Dankon al Dio! mi do ne devas ĉesi ĝin.

L.

Rebusoj.

I.

— De K. Ŝidlovskij. —

Vilaĝano havis en poŝo kelke da mono. Alirinte al rivereto, li renkontis diablon. La diablo, dezirante sin ekamuzi, proponis al la vilaĝano trifoje trairi la rivereton per la piedoj ĉe tiaj kondiĉoj: post ĉiu traŭro la kontanta sumo da mono de la vilaĝano duobligos, sed pro tio li devos ĉiufoje jeti unu rublon* en la rivereton.

* Unu rublo = cent kopekoj.

Al la vilagano tio ĉi ŝajnis loga, li konsentis; sed kiam li estis trifoje trairinta la rivereton, ĉiufoje enjetinte po unu rublon, li ne havis eĉ unu kopekon en sia poŝo.

Kiom da mono havis la vilagano, kiam li renkontis la diablon?

II.

III.

— De Paul de Lengyel. —

Amiko, min divenu:
Mi estas vira haro,
Kaj tamen mi sendube
Estas nur simpla »aro«.

Kun lakeo mi estas
angelo, — sen lakeo mi
estas maltuta restaĵo.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 11. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ankoraŭ ensendi la solvojn de l' rebusoj trovataj en la n-roj 6 kaj 7.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 5:
I. Superstiĉo. — II. Sublimato. — III. Kvarfolia trifolio.
IV. Ungoj, por grati. — V. Ne serĉu talenton per mikroskopo.

Solvis ĉiujn rebusojn: Jos. Miletz, Karl Bezin. — Ne ĉiujn rebusojn: fraŭlino Caroline Wieslander, N. Studenov, V. Gedroic, A. Caetano Coutinho, Vsev. Lojko, fraŭlino Bojena Brych kaj K. Ŝidlovskij.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en **Svedujo** ĉe la Klubo Esperantista Upsala, en **Finlando** ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur

kr. 1.— (Fmk. 1:40 p.)

po 100, — al kio sin a'metas la poŝtopago.

GRUPO DE ESPERANTISTOJ

(58 personoj, fotografiaj en 1896: Beaufront, Borovko, Gernet, Kanalossy-Lefler, Kofman, Langlet, Lemaire, Ostrovski, Trompeter, Zamenhof k. c.) estas mendebla po **3 rubloj** anstataŭ 6 rubloj, ĉe la administranto de »Lingvo Internacia«

PAUL DE LENGYEL

Szegzárd, Hungarujo.

Por la pakajo kaj poŝta sendo — 1.50 rublon.

1 rublo = 2 skand. kron. = 2.25 german. markoj = 3 frankoj = 3 aŭstr.-hung. kron.)

Rusaj esperantistoj sin turnu al la pretiganto

J. JIVOTOVSKI, en ODESSA

(kursoj de stenografio)

por la pakajo kaj poŝta sendo ili pagas 1 rublon.

Plenaj jarkolektoj de la Lingvo Internacia (1900) estas riceveblaj de mi

je duonprezo.

Kosto: 2 skand. kron. = 2.75
hung. kron. = 2.88 frankoj =
1 rublo = 2.25 ĝerm. markoj.

Paul de Lengyel

administr. de la Lingvo Internacia
en Szegzárd.

ACÉTYLÈNE * ÉCLAIRAGE

MAŜINOJ — BRULOJ — KORESPONDO

J. SABATIER, 233, rue St. Martin, PARIS.

Ĉe la Klubo Esperantista en Upsala estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo *Espero* en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo, de Paul de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzebila kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 frankoj.

LA NOMARO

de ĉiuj nun riceveblaj verkoj de la literaturo Esperanta sin trovas en la broŝuro N^o 140 (Adresaro, serio XXI); oni povas ricevi tiun ĉi broŝuron ĉe

D-ro L. Zamenhof

(Varsovio, str. Dzika N^o 9) sendinte ĝian koston aŭ per mono (45 centimoj kun transsendo) aŭ per signoj de poŝto de kia ajn lando (60 centimoj).

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväs kylän Rohdoskauppa
en Jyväs kylä.

L. I. 1899.

Sinjorojn esperantistojn, kiuj ĝis nun ne pagis la abonon kaj la anoncojn por la jaro 1899, mi tre petas sendi la monon al mi.

Hjalm. Bäckström,
Örnsköldsvik (Svedujo).

Rim. Restantaj jarkolektoj de L. I. 1899 ne estas plu riceveblaj de mi.

MI KOLEKTAS

uzitajn eksterlandajn poŝtmarkojn. Mi do petas la amikojn Esperantajn, ili volu sendi tiajn al mi. Mi estas preta je reservo, oni nur skribu, kiamaniere mi povas fari tion ĉi.

Josefo Miletz
poŝtoficisto,
Budapest, IX., Dandár-u. 26. I. 12.
Hungarujo.

AMIKOJ-ESPERANTISTOJ!

Mi verkis en rusa lingvo kaj eldonis libron:

„METODO POR INSTRUADO DE SKRIBOLEGO“

(Mjetod obuĉenija gramotje).

Tiu ĉi libro, laŭ sia enhavo, estas tute nova kaj originala. Ĝi estas interesa ne sole por specialistoj, sed ankaŭ por ĉia pli-malpli inteligenta homo, ĉar, krom skribolego, ĝi koncernas multajn komunajn demandojn de edukado kaj popola instruado. Kiam tiu ĉi libro estos disvendita, *mi donos por la celoj de nia komuna afero 10% de l' profito*, kiun alportos al mi mia eldonaĵo. Tial, mi petas vin, amikoj-esperantistoj, subtenu, laŭ eblo, mian entreprenon. La libro kostas 50 kopekojn kaj estas ricevebla laŭ sekvanta adreso: S. Peterburg, Nikolskij pereulok, N^o 8/39, knijnjy magazin tovariŝestva »Obŝĉestvjennaja Polza«.

M. S. Rakitski.